

Rezolucio

La 9a Konfederacia Kongreso de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro en Katalunio,

- Atentinte la urĝan bezonon de plena internacia kooperado de la liberecanoj en la batalo kontraŭ la kapitalismo,
- Atentinte ke tiu kooperado nepre estu regata de la procedoj de la rekta demokratio kaj ke tiu ĉi eblis nur per la uzo de komuna internacia lingvo,
- Atentinte ke ne eblas, ke tiu ĉi komuna lingvo estos iu nacia lingvo, unue kaŭze de la malfacilaĵoj por la plejmulto el la laboristoj lerni naturan lingvon, due kaŭze de la kompara ofendo, kiu estus la fakto, ke parto el la movado uzus kiel komunan lingvon sian propran denaskan lingvon kaj alia parto lingvon nur duonlernitan, kaj fine kaŭze de la ideologiaj problemoj generotaj de la ebla uzo, kiel tian komunan lingvon, de iu el la nun hegemoniaj koloniismaj lingvoj,

Decidas

1. Deklari la Internacian Lingvon Esperanto kiel la nuntempe plej taŭgan por la starigado de horizontalaj kaj egalecaj rilatoj inter la laboristoj de la tuta mondo kaj inter la liberecanaj organizoj.
2. Kuraĝigi ĉiujn organojn de la ĜKL/CGT por ke ili stimulu la disvastiĝon kaj lernadon de la Internacia Lingvo inter siaj gealiĝintoj kaj amikoj.
3. Proponi al ĉiuj liberecanaj organizoj la stimulon de la esperantolernado, cele al ebligi la uzadon de esperanto kiel laboran lingvon en la kunordigado de la internacia liberecana movado.

Lleida, la 7an de februaro de la 2010a